DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 2 (875) • 2009 •

*In hoc signo vinces* —
”En ĉi tiu signo vi venkos”

Klarigo sur paĝo 33 – Pentraĵo de Raffaelo



## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel Polnický;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| La Relevigo | 27 |
| Preĝo por ĉiu tago | 28 |
| Pri grupo kaj prupoproceso | 30 |
| Charles Darwin - 200 jara datreveno | 34 |
| Kara Redaktoro | 37 |
| Invito al internacio seminario en Bulgario | 38 |
| Pri la libreto “La pasiono de Perpetua kaj Feliĉita” | 41 |
| La laborplano de KELI (IV) | 42 |
| Raporto pri dankmeso | 44 |
| Ekumena Esperanta Kongreso | 45 |
| La Sankta Lando | 46 |
| Informetoj | 47 |
| La plej belaj floroj | 48 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Por tiu ĉi numero ne venis multaj kontribuoj kaj mi pli malfacile ol kutime plenigis la jenan numeron per diversaj artikoloj. Esperebl nur ĉi-foje tio okazis. Leginda kaj pripensinda estas la komentoj pri la laborplano fare de Adolf Burkhardt. Ĝi ĉi-foje pritraktas la neceson ke pli da legantoj kaj membroj kunlaboru por Dia Regno per raportoj kaj artikoloj. Mi forte rekomendas ke vi legu ĝin kaj provu sekvi la ideojn donitajn

Cetere la printempa varmo alvenis ĉe ni kaj multaj laboras en siaj gardenoj. Estas tempo de reviviĝo kaj en la naturo kaj ĉe homoj. La printempo signifas ankaŭ Paskon, kiu estas mesaĝo de nova vivo pro la releviĝo de Jesuo. Havu belan feston!

# La Releviĝo

Éva Farkas-Tatár, HU

Ĉar mi transdonis al vi komence tion, kion mi ankaŭ ricevis, ke Kristo mortis pro niaj pekoj laŭ la Skriboj; 4 kaj ke li estis entombigita; kaj ke li releviĝis la trian tagon laŭ la Skriboj; 5 kaj ke li aperis al Kefas; poste al la dek du; 6 poste li aperis al pli ol kvincent fratoj samtempe, el kiuj la plimulto restas ĝis nun, sed kelkaj jam ekdormis; 7 poste li aperis al Jakobo; poste al ĉiuj apostoloj; 8 kaj fine li aperis al mi ankaŭ, kiel al infano ekstertempe naskita.

1. Kor.15:3-8

La releviĝo mem estas tiel unika, sankta kaj mistera, ke apenaŭ ni povas paroli pri tio. Mi deziras iom meditadi kun vi pri la Releviĝinta Kristo. Serĉante la mallarĝan vojon, ni menciu tamen du ekstremajn ideojn pri la releviĝo, kiuj ekzistas:

1. En la elsangitan, senvivan korpon iel revenis la sango kaj la korpo ekvivis.
2. Tiel arda deziro plenigis la disĉiplojn por ankoraŭfoje vidi Jesuon, ke fine tiu deziro objektiĝis kaj ili projekciante sian sopiron ekvidis Lin.

En la supra teksto Paŭlo mem aludas pri tio, ke li nur citas iun tradician tekston (“mi ricevis”). En ĉi tiu kredkonfeso troviĝas iu esprimo, kiu en la Esperanta traduko estas: “aperis”, sed la grekan vorton estus pli bone traduki tiel, ke: Li estis “vidita” – en pasiva formo. En aktiva formo: oni malfermas la okulojn kaj vidas ion. Sed ĉi tiel, la okuloj fariĝis malfermitaj (fare de Iu ), kaj tiel ili povis ekvidi la Releviĝinton. Tiu – “estis vidita de ...” signifas, ke la apostoloj post Pasko ne el la propra volo kaj klopodo sukcesis ekvidi Jesuon sed el la graco de Dio.

Paŭlo metas sian vizion apud la travivaĵojn de la aliaj kiel samrangan, ja ĉiuj ekvidis Jesuon tiel, ke iu fortiris la vualon de antaŭ la okuloj kaj faris videbla la releviĝintan Kriston, kiu ne plu estas videbla por ĉiuj, kiel antaŭe en korpo. Paŭlo ne palpis Jesuon, sed vidis Lin kaj aŭdis Lian voĉon el la ĉielo. Lumo ĉirkaŭis lin kaj li kapitulaciis antaŭ la Venkinto. — Ĝis hodiaŭ estas donaco, se kompatema mano forigas nian blindecon por ke ni vidu Jesuon Kriston, kiu vivas kaj daŭrigas tiun aferon, kiun antaŭ la morto Li faris inter ni.

Sed kiel Li daŭrigas tion? Kia estas tiu releviĝinta Kristo? Mia respondo estas: tia sama. Multaj ŝatus kredi, ke Li estas alia ol la Nazaretano estis inter la homoj.

Ne temas pri tio, ke estis Jesuo, kiu mortis sur la kruco kaj estas la glore releviĝinta Kristo. La releviĝo ne portis novan elementon, ĝi legitimas, aprobas la krucon.

Ni memoru pri tio, ke tiuj, kiuj vidis la Releviĝinton vidis sur Li la vundojn! Tio estas simbolo, ke la sufero de Golgoto eterniĝis en Kristo. Do, ne okazis ŝanĝo, Jesuo Kristo estas la sama kaj daŭrigas sian aferon. Alia pripensinda sceno; kiel Jesuo turnas sin al Petro, kiu tiel hontiĝis en aŭroro de Vendredo. Kiom da tenera, diskreta amo estas en Liaj vortoj! Ĉu ne estas la sama voĉo, kiu diris: *"lernu ĉe mi, ĉar mi estas milda kaj korhumila"* (Mat. 11,29).

Multaj ŝatus manipuladi kun duspeca Kristo. Jes, humile, "nudpiede" Li plenumis sian servon por nia savo, sed poste releviĝis kaj nun estas brila kaj glora. Kaj la mondhistorion Li finos per grandioza juĝo. Por seniluziigi tiujn mi konfesas denove: la releviĝinta Kristo estas la sama, kia estis Jesuo, kiu en korpo vivis inter ni.

Iu foje diris tion, ke estis granda tento por la kristanismo, ke oni puŝis Jesuon Kriston en la gloran ĉielon, ĉar estis pli facile adori Lin, ol sekvi Lin.

Eble dum la festotagoj, dum diservoj aŭ silenta meditado, legante la Biblion aŭ dum preĝado denove eksonis la milda voĉo de Jesuo, kiu iam ravis nin. Li ankaŭ nun estas la sama, estas preta lavi niajn piedojn, por ke ni freŝaj kaj puraj ekiru post Li. *"Li iras antaŭ vi"* (Mark 16.7), se ni ne moviĝas, la distanco kreskas inter ni, ĉar Li iras...

## El *Preĝo por ĉiu tago* de Jelly Koopmans-Schotanus.



La 9:an de aprilo:

Potenca Dio, Via Releviĝo ankaŭ relevu min el miaj tagaj zorgoj kaj maltrankviliĝoj. Vi malfermis la pordon al Via Regno por mi. Ĝi estu malermata por ĉiu, kiu kredas en Vi.

# Kiu savas la 'diamant-infanojn'?

Jaques TUINDER, NL

La Afrikan ŝtaton Siera-Leono Uniĝintaj Nacioj elvokis 'la plej malbona loko surtera'. Dek unu hombuĉaj militoj intercivitanaj ŝanĝis ĉi tiun apud-abisman landon en neimageble konsternan kaoson. La plej korŝira grupo de militviktimoj, bedaŭrinde, estas orfoj. Unu el tri infanoj atingas eĉ ne la aĝon de kvin jaroj. Multegaj infanoj perdis siajn gepatrojn dum ĉi tiu nepriskribebla periodo. Ofte ribelantoj murdis tiujn antaŭ iliaj okuloj...

Ĉar ĉi tiu plej malriĉa lando ne havas socialan leĝaron, la kompatindaj infanoj, kelkfoje malpli ol sesjaraj, devas ĝis kompleta elĉerpiĝo labori por postvivi. Ĝenerale ili sklavas de frua mateno ĝis malfrua vespero per serĉado de diamantoj. Kaj la tagsalajro por tiu peza kaj danĝera ekspluatiĝo sumas dudek dolarcendojn aŭ nur manplenon da rizo!

Danke al la ĉielo pluraj organizaĵoj, kiuj ne timas la kruelajn eksterlandajn komercistojn, sukcese klopodas alporti helpon, savante tiujn infanojn el iliaj nehomindaj, inferaj kondiĉoj kaj serĉante bonan solvon en lokaj zorgo-familioj. Kiel la ok-jara Foday antaŭ kelke da monatoj ankoraŭ laboris en diamantminejo kaj nun povas frekventi lernejon, kie li ĉiutage ricevas manĝojn. Li estas unu el la dekoj da savitaj geknaboj. Ĉiu infano ja havas rajton je estonteco! Necesas konstrui ankaŭ lernejojn por postelementa kaj profesia instruado. Nu, anoncis sin jam pluraj pensiitaj voluntuloj helpopretaj.

Ĉiu kiu vizitas la landon kaj ekkonas la sorton mizeran de homoj vivantaj en rubodeponejoj, ne povas ne iri hejmen sen nova vivotasko. Iliaj kondiĉoj estas tiom plorigaj ke oni ne povas kredi al okuloj kaj oreloj. La tutan tagon tieaj homoj enspiras dikajn, venenajn fumonubojn. Mankas lokoj por lavi sin kaj trinki fidindan akvon. Ĉie demonadas epidemioj. Daŭre atakadas la malaria moskito, kiu kulpas pri la morto de sennombraj infanoj.

El Nederlando alfluadas vizitantoj, kiuj decidis etendi manon helpantan al la infanoj. Kreskis iniciatoj de ekzistantaj kaj novaj organizaĵoj, ankaŭ de kabaredistoj, instruistoj, lernejanoj. Interese kaj sekve menciinde estas, ke eĉ flanke de sentegmentuloj kaj surstratuloj venis voĉoj: ni volas kontribui al pli bona sorto de niaj foraj kunviktimetoj. Ili opinias, ke ni hontu se ni neniel kompatas tiujn infanojn jam tiom traŭmatigitajn.

Mi povas nur esperi, ke ankaŭ el aliaj landoj baldaŭ helpokampanjoj komenciĝos, por ke plej rapide finiĝu ĉi tiu terura tragedio!

# Pri grupo kaj grupoproceso

Bengt Olof Åradsson, SE

La komentoj de Adolf Burkhardt pri la KELI laborplano, ĉifoje instigis min verki tiun ĉiu artikolon. Ankaŭ la fakto ke mankis al mi kontribuoj al tiu ĉi numero de Dia Regno igis min mem verki, ĉar mi ne volis lasi al vi blankajn paĝojn en la gazeto.

Mia temo pri grupoj originas el mia antaŭa laboro. Mi dum pluraj jaroj profesie provis evoluigi grupojn por ke ili pli bone funkciu. Por pli bone kompreni la teorian bazon, mi studis ankaŭ psikologion kaj sociologion pri grupoj kaj organizoj. Do mia sperto venas el du fontoj: praktika laboro *kiel fari* kaj teoria studo pri *kio okazas.*

La grupoproceso, temas inter alie pri tio kiel la individuoj en la grupo agas kiam ili devas solvi problemon aŭ fari decidon aŭ interrilati kun aliaj grupoj. En mia laboro ni ĉefe bazigis nian instruadon/ trejnadon sur la esploro de Will Schutz, usona psikologo, sed ankaŭ sur aliaj postmilitaj spertoj de aliaj esploristoj.

Will Schutz jam dum la 50aj jaroj studis la kialojn kial similaj grupoj, kun simila trejnado havante similajn ilojn, tamen ne same efike funkciis. La teorio aŭ modelo, kiun li formis post tiu studado, nomiĝas FIRO (*Fundamental Interpesonal Relations Orientation;* [libere tradukita: fundamenta orientiĝo de interpersonaj rilatoj]).

La modelo provas klarigi kiel grupo normale evoluas por efikeco kaj bona funkciado. Schutz trovis ke la diferenco de la efikecoj de la grupoj multe rezultis el la maniero de komunikado kaj la personaj rilatoj inter la membroj en la grupoj. FIRO jam delonge formas la bazon de multaj ĉef-kursoj en Svedio kaj precipe ĉe la armeo.

Kompreneble ekzistas multaj aliaj modeloj por klarigi la grupan proceson. La plej multaj, kaj inter ili la FIRO-modelo, apartenas al la tiel nomataj *cirklaj tipoj.* La simileco inter la modeloj estas granda kaj plejparte ili diferenciĝas pri la kvanto de stadioj kaj kiel ili nomiĝas. La diversaj stadioj kaj la ĝenerala proceso tamen posedas pli malpli la saman enhavon. Vere, la realeco, la vera grupo, kiun oni studas kaj priskribas, restas ja la sama.



Ludgrupo

Grupo en tiu ĉi artikolo signifas aron de individuoj kun komuna celo kaj internaj rilatoj. Ekzemple laborgrupo pri aparta tasko dum limigita periodo. Aro da homoj kiuj samtempe atendas buson ne estas grupo en tiu ĉi senco. Eble ili havas saman vojcelon sed ili ne interrilatas.

Ni ĉiuj havas spertojn de diversaj grupoj. La unua grupo al kiu ni apartenis estis nia familio. Poste ni apartenis al lerneja klaso, eble ankaŭ al iu sporta grupo. Kelkaj faris sian militservon ktp. Kaj la spertoj de tiuj grupoj ankaŭ diferenciĝas – kelkaj pli bonaj ol aliaj.

Ni apartenas al pluraj diversaj grupoj samtempe. Hejme en la familio, en nia laborloko, en nia eklezio aŭ hobiaj grupoj. La kutima membraro estas 8-15 personoj. Se la grupo estas pli granda, ĝi kutime partiĝas en plurajn (sub)-grupojn ĉar ni kiel individuoj ne kapablas rilati al pli multe da personoj.

Aliaj faktoroj ol tiuj, kiujn mi pritraktas en tiu ĉi artikolo, ankaŭ influas la grupojn. Precipe se temas pri malgrandaj grupoj ekz familioj. En normala laborloko la individuoj ankaŭ havas estintajn kaj estontajn rilatojn kiuj influas iliajn agadojn kaj sintenojn.




La grupo estas grava kaj donas al la individuo identecon, kreas "NI"-senton. En la grupo la membro sentas sekurecon, kaj disponas komunajn rimedojn. La individuoj havas komunajn historion/memorojn, lingvon kaj formas siajn tradiciojn eble eĉ "uniformojn" ktp. Tiuj ecoj kiuj ligas la grupmembrojn ofte ankaŭ diferencigas la propran grupon de aliaj grupoj: "ili NE estas tiaj aŭ tiaj, kiel ni estas".


Sukcesaj gvidantoj de sportaj teamoj utiligas la grupon kaj kapablas krei maturan NI-senton kaj fortan komunan celon. Kelkfoje la identeco tiel fortiĝas ke la grupo evoluas malsane kaj malfermas sin kontraŭ eksteraj influoj. Tio estas inter alie la bazo por rasismo kaj similaj manifestiĝoj.

## FIRO

Sed kiel formi grupon? Ĉu troviĝas iu metodo aŭ ĉeno da agadoj kiuj direktas grupon al efika teamo. La FIRO-modelo priskribas tri stadiojn plus du transirajn etapojn. Ĝi ne estas agadplano en si mem, sed priskribas la necesaĵojn de normala evoluo de grupo. Iel la grupo devas prilabori, en si mem kaj profunde, tiujn necesaĵojn.

La tri stadioj, kiujn la grupo devas trairi /travivi se ĝi volas atingi la finan funkcian efikecon, estas (la nomoj libere tradukitaj):

- Aparteneco
- Kontrolo / rolserĉado
- Interligiteco




**Aparteneco** estas la unua stadio de la (malmatura) grupa vivo kaj ĝi temas ĉefe pri mia intereso kaj bezono kiel estonta membro en la grupo kaj reciproke la grupa intereso – ĉu mi apartenu al la grupo aŭ ne. Antaŭ ol mi eniras grupon (kaj antaŭ ol la grupo akceptas min kiel novan membron), ni devas klarigi (eble subkonscie) inter alie la *celon* de la grupo kaj la *regulojn* kiuj regas en la grupo. Mi ankaŭ volas *ekkoni* la aliajn membrojn. Ofte oni uzas bildon pri malgranda remboato. Antaŭ ol mi ensidas en la boaton, mi volas scii kien ĝi celas, kiuj estas la aliaj sidante en la boato, ĉu ĉiuj devas remi, ĉu onni rajtas stari en la boato kaj ĉu oni devas porti savoveŝton k.s? Similajn demandojn havas la jam ekzistanta grupo pri mi. DO baze mi havas bezonon esti akceptata de la grupo kaj mi ankaŭ agas laŭcele, iom "politike konforme" kaj afable kontraŭ la aliaj.

Baza demando: ene aŭ ekstere?

**Kontrolo/rolserĉado** estas la dua stadio kaj por multaj malfacila periodo. Okazas dum kursoj ke partoprenantoj forlasas la grupon dum tiu stadio. La grupo kiel unuo estas ege malefika ĉar granda kvanto de ĝia energio estas uzata por internaj konfliktoj kaj problemoj.

Dum tiu ĉi periodo la individuo rilatas al la aliaj por trovi sian lokon, sian *rangon*. Temas pri la *rolo* kiun oni ludas en la grupo, la gravecon kaj respondecon kiun oni postulas/pretendas. Ĉu la aliaj en la grupo akceptas tiun rolon?

Uzante la bildon pri la remboato oni povas imagi la ŝipestron kaj la aliajn oficistojn ĝis la plej malaltranga maristo. Kiun rangon mi aspiras kaj kiun donas la grupo al mi. Ĉu mi ĝin akceptas?

Baza demando: sube aŭ supre?

**Interligiteco** estas la tria kaj lasta stadio de la vivo de la (matura) grupo. En tiu ĉi stadio la grupo efike laboras. Mi scias kaj mian rolon kaj la rolojn de miaj grupmembroj. Mi kunlaboras kun tiuj kiuj helpas al nia kuna labortasko, depende de niaj kompetentecoj sed ankaŭ laŭ niaj preferoj, niaj labormanieroj kaj personecoj, niaj komprenoj k.s. Ni scias kiel solvi konfliktojn jam de la komenco kaj la grupo ne bezonas elspezi energion pri internaj aferoj sed povas direkti ĝin al siaj taskoj.

La individuoj en la grupo montras malfermecon ankaŭ pri pli personaj aferoj kaj sentoj kaj ne pritraktas nur fakajn kaj teknikajn flankojn. La baza timo kiu ekzistis je la komenco (ĉu la grupo akceptas min) nun estas for. Se ni ankaŭ tie ĉi uzas la bildon pri la remboato, oni povas imagi ke la individuo preferas apud kiu ĝi volas sidi.

La baza demando estas: proksime aŭ malproksime?

Grava punkto, kiun la grupo ankaŭ

devas pritrakti, estas la bazaj *valoroj,* kiujn havas la membroj. Tiun punkton kelkaj personoj atribuas al la fino de la unua stadio kaj aliaj al la komenco de la dua. Ne grave kie, sed estas grava vidpunkto ke mi samopinias pri bazaj valoroj. Ĉu mi povas kunlabori kun tiuj kiuj havas aliajn vidpunktojn pri bazaj (viv-)valoroj? Parte tio dependas de la celo. Eble la celo estas tiel grava ke la malsamopinioj ne gravas. Kun alia celo, malpli grava, la diferenco en opinioj eble estas tro granda por ke mi povu resti en la grupo. Ne valoras la penon.

Ekz. se mi spertas boatakcidenton, mia unua celo estas travivi kaj mi en tiu situacio volonte akceptas kiun ajn kiu volas remi la savboaton kune kun mi. Simile aliaj certe ankaŭ akceptas min kiel kunremanto. Kiam ni atingas la marbordon kaj nia celo plenumiĝas, mi eble ne volas daŭrigi la kontakton kun ekz. rasisto aŭ krimulo.

Se io okazas en la grupo, ekz. membro ial eksiĝas aŭ nova alvenas, la grupo devas komenci denove en la unua stadio. La grupo ja estas "nova" kaj novaj rilatoj formiĝas kaj oni denove devas trovi sian rolon. Sed nun la grupo pli rapide evoluas.

Plejparte la modelo, kiun Will Schutz elformis, estas aplikebla sur "fremdaj grupoj". Tio signifas ke la homoj kiuj venas al la grupo antaŭe ne havis rilatojn sed komencas tion "freŝe". Se pluraj membroj jam havas rilatojn unu kun la alia, la situacio estas iom pli komplika kaj eble la grupo ne same glate evoluas.

"Fanatikuloj" pri la FIRO-modelo opinias ke la modelo estas aplikebla eĉ en malgrandaj kunvenoj dum ege limigita tempo, ekz. kaftrinkpaŭzo. Oni ankaŭ en tiuj situacio serĉas sian rolon, sian gravecon, sed ankaŭ la bazan demandon pri la celo de la interparolo, samopinio kaj simile.

## Sekvonta paŝo...

Kun tiu ĉi bazo mi komencis pripensi niajn ĉiusemajnajn grupojn kiuj formiĝas dum diservo. Ĉu eblas uzi la modelon de FIRO pri tiuj grupoj? Pri tiu temo mi volas skribi duan artikolon kiun espereble mi povas publikigi jam sekvontnumere.

Ĝis tiam vi havos eblecon komenti, demandi kaj havi opiniojn (vidu la retadreson ĉe la redaktoro). Komprenēble ankaŭ vi mem povas verki artikolon laŭ viaj interesoj kaj scioj. Legu la laborplanon en tiu ĉi numero kaj agu laŭeble.

## Klarigo al la bildo sur la fronta paĝo:

Konstantino la Granda estis la unua kiu uzis la krucon kiel kristana simbolo. Laŭ legendoj, je 312, dum la antaŭvespero de la Batalo de Ponto Milvio, Konstantino vidis oran krucon en la ĉielo kaj en la kruco la vortojn *In hoc signo vinces* - "En ĉi tiu signo vi venkos". Li ordonis meti krucan simbolon (labaro) sur la flagoj kaj ŝildoj de lia armeo kaj li venkis. [el Vikipedio]

# Charles Darwin – 200-jara datreveno

Teksto el Vikipedio
http://eo.wikipedia.org/wiki/Charles_Darwin

Darwin naskiĝis antaŭ 200-jaroj. Li kaj Galileo verŝajne estas tiuj kiuj el sciencaj vidpunktoj plej multe influis la homaron kaj la kristanan kredon. Por multaj ankoraŭ estas problemo kiel kombino la evoluan hipotezon kun la rakonto pri la Dia kreado. La jena teksto estas ĉerpita el Vikipedio. /Red

**Charles Robert DARWIN**, foje esperantigita kiel **Karolo Roberto Darvino**, (naskiĝis la 12-an de februaro 1809, mortis la 19-an de aprilo 1882) estis angla sciencisto, kiu fondis la teorion de evoluismo per natura selektado, kiun li klarigis en gravega verko, *Origin of Species* ("Origino de Specioj") eldonita en 1859. Kune kun la genetika teorio de la aŭstra monaĥo Mendelo pri la heredado de trajtoj, la teorio de Darvino preparis la grundon por la moderna scienca biologio.



Memore al Darvino

## Junaj jaroj

Kiel junulo, Darvino studis la medicinan kaj pastoran artojn. Sed, en 1831, havante 22 jarojn, ŝatanto de skaraboj sen direkto en vivo, Darvino vojaĝis ĉirkaŭ la Tero en la ŝipo *HMS Beagle*, dum kvin jaroj. La ŝipo esploris en detalo la bordon de Sudameriko por la brita mararmeo, kaj Darvino servis kiel la naturscienca oficiro de la vojaĝo. Dum la vojaĝo Darvino legis la novan libron de Charles Lyell pri la Tero, kiu profunde influis lin, kaj studis la plantaĵojn kaj bestojn de Sudameriko. Li miris kaj pensis pri la granda varieco de vivo, kiun li renkontis — precipe en la insuloj de Galapagoj, kie ĉiu insulo havas sian propran specon de testudo, fringo kaj marigvano.

Darvino pensis pri la varieco laŭ la ideoj de Lyell. Lyell diris ke la nuna Tero estas la sama kiel la antikva Tero: la kaŭzoj kiuj formis la teron, ankoraŭ agas nun, iom post iom, daŭre kaj malrapide tra la epokoj. Kiel rivero formas sian vojon. Ĉi tiu estas la skolo de samaspektismo. La kontraŭa, tradicia

skolo, katastrofismo, diris ke ŝanĝo estas grandega kaj subita: la kreo de la mondo de Dio, la inundo de Noa, ekzemple. Bona religio, eble, sed malbona scienco, certe: scienco nur povas atesti pri tio, kion oni povas observi laŭ regulo.

Tial laŭ Lyell, se vivo evoluis antaŭe, ĝi ankoraŭ evoluas nun, kvankam tre malrapide kaj per malgrandaj paŝoj.

## Post la vojaĝo

En 1837, post kiam li revenis al Britio, Darvino priskribis la vojaĝon en *Vojaĝo de la Beagle*. Tiam li studis kaj pensis pri evoluo. Kiel lia avo, Erasmo Darvino, Darvino kredis ke specoj de vivaĵoj evoluas – la rezulton li vidis en Galapago kaj eĉ en Britio en la multaj rasoj de kolomboj, selektiitaj de homo. Sed kredo ne estas klarigo: kvankam li kredis ke evoluo okazis, li ne povis klarigi la manieron. Darvino ja komprenis la selektadon de kolomboj – homoj elektis kolombojn por naskigi la novan generacion – sed ne tia la naturan selektadon. Kie estas la nevidebla mano kiu elektas la gepatrojn de la venonta generacio? Laŭ Lyell, la nevidebla mano ekzistas nune, ie antaŭ la okulo de Darvino. Sed kie?

La solvo venis al Darvino unu nokton en 1839 kiam li legis verkon de Maltuso. Maltuso diris ke la homaro estos malriĉa kaj malsata por ĉiam ĉar la nova generacio ĉiam estos pli granda ol la havo de nutraĵo. Tial iuj homoj devos morti pro manko de nutraĵo. Tio montris al Darvino la nevideblan manon: malsato kaj morto. Pro la manko de nutraĵo, nur la plej bonaj anoj de speco povas travivi sufiĉe longe por naski la novan generacion, kiu plejparte heredos ilian bonecon, ktp. Tian elekton de la naturo Darvino nomis natura selektado (supervivo de la plej taŭgaj). Ĝi estas la klarigo de la evoluo, la klarigo kiun lia avo, kaj multaj aliaj, ne povis vidi. Tiu fariĝis lia teorio de evoluismo.

Darvino kaŝe priskribas siajn ideojn en libro kaj rakontis pri tiu sole al fidindaj amikoj. Li ne eldonis la libron ĉar la evoluo staris kontraŭ la kristanismo, la sincera kredo de multaj el liaj parencoj kaj samlandanoj. Laŭ la sankta libro de la kristanismo, la Biblio, Dio kreis homon kaj ĉiun specon de vivo en la komenco de la mondo, kiel diras la unua ĉapitro de Genezo.

Darvino ade studis kaj verkis pri biologio, sed en 1856, juna biologo, Alfredo Ruselo Valaso sendis leteron al Darvino, petante konsilon. Valaso ankaŭ vojaĝis ĉirkaŭ la mondo, ankaŭ studis vivon de insuloj (de Indonezio), ankaŭ legis Maltuson, kaj ankaŭ eltrovis la




ideon de natura selektado. La letero puŝis Darvinon al eldonado. En 1858, Darvino kaj Valaso anoncis la eltrovon kaj, en 1859, Darvino eldonis la faman verkon, *Origin of Species* ("Origino de Specioj"), kiu klarigas kaj subtenas lian teorion de evoluismo.

Kvankam evoluismo detruis la kristanan fidon de Darvino, ĝi ne detruis la fidon de Valaso. Valaso kredis ke homo estis escepto de la regulo de evoluismo: ne pro vantaĵo aŭ fido, sed ĉar evoluismo ne povas sufiĉe klarigi kiel la homa menso estis farita. Darvino ne konsentis kaj klarigis tion en sia alia ĉefa verko, *Descent of Man* (“Deveno de Homo”) en 1871.

Darvino antaŭsupozis heredon de trajto de generacio al generacio, sed li ne sciis kiel tio okazas. La genoj estis eltrovitaj poste de Mendelo kaj aliaj.


La teorio de Darvino skuis la kristanan fidon de la Okcidento kaj Darvino mem perdis sian fidon kaj mortis kiel nekredanto.




La unuaj notoj de Darvino pri lia teorio.

## Post morto

Post la morto, la evoluismo de Darvino naskis en politikaj kaj ekonomiaj rondoj la t.n. socian darvinismon, kiu aplikis iujn principojn derivitajn el la biologia teorio al sociaj rilatoj inter homoj, tiel “pravigante” diversajn plejparte reak-




La vojaĝo de *Beagle*

ciajn aŭ imperialismajn praktikojn.


Aliflanke, en religiaj rondoj (precipe ĉe protestantismo, kaj antaŭ ĉio en Usono) oni perceptis la darvinan evoluismon kiel atakon kontraŭ la Biblio, kaj la rezulta reago estis la fundamentismo (ne konfuzenda kun la Esperanta fundamentismo); lastatempe tiu movado naskis la kreismon*, kiu proponas la unuan ĉapitron de la Biblio kiel seriozan sciencon, kiu do estas kontraŭ-evoluisma.

*** Kreismo** estas la opinio, ke la universo kaj la planedo Tero, sed ankaŭ ĉiuj plantoj kaj animaloj inkluzive de la homo dankas sian ekziston al speciala ago de kreado. Ĉi tiu kreado povas esti rigardata kiel sufiĉe subita okazaĵo aŭ kiel iompostioma kaj daŭra procezo.

Oni povas distingi inter 'speciala kreado' kaj ĝenerala kreado. Pri kreistoj oni povas diri, ke ili estas adeptoj de 'speciala kreado'. Aliaj kredantoj sin apogas sur kreanta Dio, sed tamen kredas, ke tiu ne aktive rompis la naturleĝojn de sia propra kreado, por interveni en ĝi.

Sub la influo de la kristana kreismo ankaŭ en la islamo ekestis kreisma movado, de kiu multaj argumentoj estas inspiritaj de la kristana, kvankam ili pli estas adeptoj de la maljuntera kreismo [esperante/angle: juntera kreismo = young-earth creationism; maljuntera kreismo = old-earth creationism]. Tamen estas pli da religioj, kiuj havas kreisman doktrinon konforman al siaj sanktaj skribaĵoj. Tiel kelkaj tendencoj de la hinduismo, surbaze de certaj tekstoj en la Vedoj, supozas, ke la tero havas aĝon de 15 miliardoj da jaroj kaj ke la homo ekzistis dum ĉiuj tiuj jaroj.

---



## Kara Redaktoro!

Mi ricevis lastajn numerojn de Dia Regno orde, sed tamen en angulo de unu kajero montriĝis difekto. Pli ekzakta ekzameno de tiu angulo ŝajnigas al mi, ke dum poŝta transporto ie muso trovis plaĉon ankaŭ de Dia Regno kaj postlasis okulfrape spurojn.

Do Dia Regno servas kaj al kredantoj kaj al bestaro!!!

Kun koraj salutoj restas
Karl Heinz Schaeffer

Invito al internacia seminario en Bulgario

## "Apliko de Esperanto en la faka kaj profesia agado " Karlovo 12-15.06.2009

Mi sendas la unuan informilon por la Internacia seminario *"Apliko de Esperanto en la faka kaj profesia agado"* /Karlovo 12-15.06.2009/.

Por la unua fojo en nia lando, ni opinias, ke ankaŭ en la internacia E-movado, ni la estraranoj de BEA kune kun AIS Bulgario, IUK kaj la neesperantista organizo "Scienc-teknika Asocio" en Bulgario decidis organizi E-seminarion ne nur por esperantistoj, sed ankaŭ por la fakuloj, kiuj ne parolas esperante.

Oficiala lingvo estos Esperanto sed laborlingvoj ankaŭ estos bulgara kaj la lingvoj de la scienculoj kaj fakuloj el diversaj landoj, kiuj ne estas esperantistoj sed partoprenos la seminarion kaj dezirus per Esperanto fari kontaktojn kun gekolegoj-fakuloj. Jam aliĝis famaj bulgaraj scienculoj, universitataj profesoroj, kiuj ne estas esperantistoj kaj kies prelegojn ni tradukos. Ili dezirus konatiĝi kaj kunlabori kun gekolegoj kaj samfakuloj en diversaj landoj. Ni same petas Vin se eblas informi pri nia Seminario kaj inviti Viajn gekolegojn, kiuj dezirus partopreni kaj prelegi nacilingve. Vi povus koncize traduki esperanten iliajn prelegojn kaj ankaŭ la diskutojn. Tiamaniere ili povus persone konatiĝi kaj kunlabori kun bulgaraj kaj eksterlandaj gekolegoj, samfakuloj.

La ĉefa celo de nia Seminario estas prezenti al la fakuloj tutmonde, ke Esperanto estas ne nur lingvo por kontaktoj kaj kunlaboro inter la esperantistoj. Sed ke fakuloj-neesperantistoj partoprenonte nian Seminarion povus mem kompreni kiamaniere Esperanto povus esti utila por iliaj internaciaj fakaj kontaktoj. Por tio ni estos tre dankemaj al Vi, se Vi povus mem partopreni kaj ankaŭ inviti Viajn gekolegojn .

Temoj de la prelegoj: diversaj sciencaj kaj fakaj prelegoj kunligitaj kun profesia agado de la prelegonto. La prelegonto povos prezenti koncize sian prelegon kaj poste estos diskutoj pri la temo. La plenan tekston de la prelego ni publikigos post la seminario en prelegaro. Ni petas la prelegontojn ĝis 25.05 sendi al ni resumojn de la prelegoj, ĉar ni dezirus disdoni ilin al la partoprenontoj en la komenco de la Seminario.

Seminarejo: Internacia Universitato Karlovo. La solena inaŭguro estos en la urbodomo.

Situo de Karlovo: Karlovo estas situanta en la centro de Bulgario kaj estas facile atingebla de Plovdivo /60km/, Sofio /150km/ Burgas, Varna, Ruse. La prezoj de la biletoj estas ĝis Sofio – 4 eŭroj; Plovdivo – 2 eŭroj; Burgas, Varna, Ruse – 8 eŭroj. Por la aliĝontoj ni sendos detalan horaron de la vagonaroj kaj busoj. Ni atendos la

partoprenontojn en la stacidomo Karlovo kaj busstacio Karlovo.

Antaŭ/postseminaria ripozo: Por la dezirontoj ni povus organizi la tranoktadon en Karlovo kaj ĉe la maro tre malmultekoste. Karlovo /6 eŭroj/, ĉe la maro /8-10 eŭroj/. Por tiuj kiuj dezirus ripozi en Karlovo, ĉar kiel mi jam menciis ĝi estas situanta en la centro de la lando, ni povus organizi diversajn ekskursojn: al Plovdivo, Baĉkova monaĥejo, Gabrovo, Trojan, Stara Zagora k.a. Por tiuj, kiuj ŝatas ekskursi al monto, povus tion fari ĉiutage, ĉar Karlovo estas situanta en la centro de la fame konata Roza valo kaj ĉe la piedo de la monto Stara Planina. En la komenco de junio /06-07 .06.2009 / estos la tradicia Nacia festo de la Rozo en Karlovo kaj tiuj, kiuj deziras, povus veni pli frue kaj ni certigos por ili tranoktadon en nia studenta domo.

Tranoktado: en studenta domo, privataj domoj kaj hoteloj.

Manĝado: libervole en la universitata bufedo aŭ proksimaj manĝejoj kaj restoracioj. La nutrado en Bulgario estas tre malmultekosta. Ekz. en la universitata bufedo Vi povus trinki kafon kaj teon por 0,3 eŭroj, bieron 0,6-0,8 eŭroj, manĝi sandviĉon ĝis 1 eŭro k.t.p. En la proksimaj manĝejoj kaj familiaj restoracietoj Vi povus pagi por tag- kaj vespermanĝo entute ĝis 8-10 eŭroj.

Aliĝo: Ni petas la partoprenontoj sendi al ni la aliĝilojn siatempe. La aliĝkotizoj estos pageblaj surloke kune kun la tranoktado, sed ni deziras havi fruan informon kaj tiamaniere ni povus rezervi kaj garantii la tranoktadon. La aliĝilojn Vi povus sendi rete al nia adreso: leonov@rozabg.com
aŭ: Bulgario 4300 Karlovo p.k. 44 Internacia Seminario

Pli detalajn informojn Vi povus ricevi skribante al nia reta aŭ poŝta adreso kaj same telefonante al mi : +359 885056469

Kiel Vi jam komprenas, nia seminario ne estos nur por esperantistoj – ni dezirus prezenti al la oficialaj instancoj en nia lando kaj eksterlande, ke Esperanto ne estas nur komuna lingvo por babilado, amuzo kaj kontaktoj inter la esperantistoj, sed Esperanto povus esti kaj devas esti oficiala lingvo por kontaktoj kaj kunlaboro en diversaj sciencaj kaj profesiaj fakaj seminarioj. Per Via partopreno kaj partopreno de Viaj geamikoj Vi kontribuos por la sukceso de nia unua provo en tiu direkto.

Kun plej koraj salutoj, antaŭdanko por Via helpo kaj atendante Vin en Karlovo

restas nome de la Organiza komitato
amike Via
Prof. Bojidar Leonov
PREZIDANTO de AIS-Bulgario
REKTORO de IUK
VICPREZIDANTO de BEA



# INTERNACIA SEMINARIO 12-15.06.2009 Karlovo

## "Apliko de Esperanto en la faka kaj profesia agado"

**Organizantoj:** BEA, AIS- Bulgario, Internacia Universitato Karlovo kune kun la neesperantista organizo "Scienc-teknika Asocio" en Bulgario

**Oficiala lingvo:** Esperanto

**Laborlingvoj:** naciaj lingvoj de la partoprenontoj neesperantistoj.

**Temoj de la prelegoj:** diversaj sciencaj kaj fakaj prelegoj kunligitaj kun la profesia agado de la partoprenonto. La prelegontoj prezentos koncize sian prelegon /ĝis 30 min./ kaj poste estos diskutoj pri la temo. La plena teksto de la prelego aperos en la Seminaria prelegaro.

**Aliĝo-Aliĝkotizo:** ĝis 15.04.2009 – 10/dek/ eŭroj;
ĝis 25.05 – 15/dekkvin/ eŭroj

La aliĝkotizo estas pagebla surloke. La aliĝontoj estas petataj nur sendi la aliĝilojn ĝis la menciitaj limdatoj.

**Kotizoj por unu tranokto:**

6 eŭroj en studenta domo; 7 eŭroj en privataj domoj; 15-30 eŭroj en hoteloj.
La kotizoj por la tranoktado estas pageblaj surloke

**Manĝado:** libervole en la universitata bufedo kaj proksimaj manĝejoj.

**Limdato por senditaj resumoj:** 25.05

**Antaŭ-aŭ postseminaria ripozo:** en Karlovo kaj ĉe la Nigra maro. Dezirontoj povus ripozi pagonte surloke malmultekostan tranoktadon.

**Adreso por aliĝo kaj informoj:** rete: leonov@rozabg.com
aŭ poŝte: Bulgario; 4300 Karlovo; p.k.44 – IUK
telefone: +359 885056469 – prof. Leonov

**Provizora programo**:

| | |
|---|---|
| 12.06 | Alveno, Inaŭguro, prelegoj |
| 13.06 | Prelegoj kaj diskutoj |
| 14.06 | Prelegoj, Fermo, Ekskurso |
| 15 06 | Forveturo |

La aliĝontoj ricevos pli detalan programon kaj informojn

### A L I Ĝ I L O

Nomo.............................................................................................................
Adreso......................................................................... Tel..........................
E-mail............................................................................................................
Mi prelegos: **JES / NE** Temo de la prelego..................................................
.......................................................................................................................
Mi deziras tranokti en: ☐ studenta domo, ☐ privata domo, ☐ hotelo
Mi dezirus ripozi **ANTAŬ / POST** la seminario **JES / NE**
Dato ................ 2009 Subskribo :......................................................

Pri la libreto




# La pasiono de Perpetua kaj Feliĉita

Rezencas Bengt Olof Åradsson

Mi havis la favoron tralegi la libreton *La pasiono de Perpetua kaj Feliĉita",* kiun tradukis Gerrit Berveling. La enkonduko estas konciza kaj informoplena kaj mi citas ĝin sekve:

> "En la monaĥejo *Monte Cassino* la prefekto de la Vatikana biblioteko Lucas Holstenius meze de la 17a jc malkovris la Latinan tekston de l' *Pasiono de Perpetua kaj Feliĉita* (Passio Perpetuae et Felicitatis); la unua eldono aperis en 1663. ... La plimulto de la fakuloj konsideras Tertulianon kiel la spiritan patron de la Pasiono en ĝia fina formo: la viziojn de la martiroj li do kunigis kaj provizis per enkonduko kaj postparolo. La tuto estas sufiĉe unika teksto. Tempe de la okazaĵoj ĉi tie raportitaj Tertuliano estis en Kartago. La martiroj devenis el Kartago aŭ el apuda urbeto *Thurburbo minus*. Ili estis kondamnitaj, kaj mortis la 7an de marto 203."

Do temas pri kelkaj kristanoj, inter ili unu juna virino Perpetua el nobla familio kun suĉinfano kaj ŝia sklavino Feliĉita. Ili estas enkarcerigitaj pro sia kredo kaj atendas la martiran morton per la tiutempaj "ludoj", batalo kontraŭ sovaĝaj bestoj. La libreto estas plejparte la taglibro de Perpetua kaj ŝiaj vizioj. Ŝi ankaŭ priskribas la rilaton kun sia nekredanta patro. Tio ankaŭ signifas ke la libro estas unu el la plej fruaj kristanaj verkoj far virino.

Laŭ mi, tiuj priskriboj el la tempoperiodo post la bibliaj leteroj kaj la Agoj, estas valoraj kaj pripensindaj por ĉiu kristano. Almenaŭ mi ne multe legis, krom kelkaj romanoj, pri kio okazis inter la 1:a jc kaj la tempo de la reformacio. Kiuj portis pluen la kristanan mesaĝon al la sekvontaj generacioj? Kiel ili vivis kaj montris sian kristanan vivon? Kiam mi legas la rakontojn pri tiuj kredantoj, mi demandas min mem ĉu eble nia hodiaŭa kredo tro filozofiiĝis?

La serio de Gerrit Berveling provas helpi al ni, ke ni povu lerni pli pri niaj antaŭuloj. Kaj la libretoj, kiujn mi ĝis nun vidis, estas facile tralegeblaj, kaj pro la maldikeco (28p) kaj pro la simpla lingvo, krom eble kelkaj fakaj vortoj.

Mi esperas ke la libretoj estos troveblaj sur la librotablo dum la ekumena kongreso. Alie vi povas mendi ilin rekte ĉe Berveling aŭ ĉe UEA. Ĝi kostas 2,70 Eŭroj.




Ni daŭrigas nian re-publikigon de la serio de artikoletoj, kiujn verkis la tiama prezidanto Adolf Burkhardt. La serio baziĝas sur la laborplano origine decidita en Strandbaden 1962. Kvankam la serio estis verkata en la tiama situacio kaj tempo, multe validas ankoraŭ hodiaŭ. Legu la jenan artikolon kaj trovu la valoraĵojn en ĝi! /red

# "Nia laboro ne estas vana en la Sinjoro"

## Laborplano de KELI (IV)

Adolf BURKHARDT†, DE

### 4) Trovi pli da kompetentaj kunlaborantoj al DIA REGNO por plifaciligi la taskon de la redaktoro.

*a) Raporti pri aktualaĵoj.*

Dia Regno estas la organo, per kiu la membraro dise tra la mondo restas en kontakto – sed dependas de la regula informado al la redaktoro, ĉu tiu kontakto estas nur de la estraro al la membroj aŭ vere reciproka partopreno de ĉiuj en la tuto da aktivecoj pli malpli signifaj. Persone mi estas konvikita, ke en la nuna stadio de la Esperanto-movado kaj ankoraŭ longe la ĉefa tasko de ni Liga revuo estas ĝuste tio, ke ĝi informu pri laboroj, planoj, sukcesoj, eraroj kaj esperoj de la sekcioj kaj individuaj laborantoj. Tiun instigon bezonas verŝajne ĉiu el ni. Tiurilate

nepre necesas formeti sian modestecon kaj raporti pri tio kio okazis, eĉ kiam oni devas mencii la propran nomon. Tio ne estas fanfarono, sed grava servo al la aliaj, kiuj bezonas ĉian kuraĝigon kaj helpon. Se dum iom longa periodo tute ne aperas novaĵo el iu lando aŭ sekcio, tio devas maltrankviligi nin, kaj se KELI estus riĉa, tiuokaze ĝi devus sendi specialan komisiiton por esplori la situacion ….

Kiu ne plene fidas sian lingvo-scion, tamen skribu. Kvankam la redaktoro ŝatas ricevi senmankajn manuskriptojn, li plezure elspezos la tempon por redakti interesan informon.

*b) Verki artikolojn kun ĝenerala intereso*.
Tute nature ne ĉiu kapablas kontribui verkiste. Ankaŭ pri la temoj estus malfacile difini klaran gvidlinion. Unu deziras detalan studon, kiu ne nur supraĵe tuŝetas la temon, sed vere funde pritraktas ĝin. Alia preferas mallongajn artikoletojn – ĉu pro la facieleco, ĉu pro la eventualo traduki kaj publikigi en nacia lingvo. Trafoliumante jarkolekton de DR, oni konstatos, ke la redakcio klopodas laŭeble kontentigi ambaŭ dezirojn. Sendube inter ni estas ankoraŭ aliaj, kiuj estas fakuloj pri difinita temo, sed neniam gis nun komunikis al la aliaj ion pri sia laboro. Jen instigo al ili serioze konsideri aktivan kunlaboron al DR.


*c) Traduki interesajn artikolojn*.
Kvankam ni preferas originalajn kontribuojn, bona tradukaĵo sendube estas pli valora ol subkvalita originalaĵo. Tradukinto nepre mem zorgu pri la traduk-permeso, por eviti ĝenon al la redaktoro. Ĉar unu grava celo de nia Ligo estas interkonatigi anojn de malsamaj eklezioj, tipaj verketoj el diversaj landoj povas helpi al la realigo de tiu deziro.

*d) Konscie legi la enhavon de DIA REGNO*
Tiuspeca kunlaboro al DR estas ne malpli grava ol la unue nomitaj aktivaj kontribuoj. Redaktoro kaj verkistoj vane laboras, se oni ne zorge legas la kelkajn paĝojn de nia [du-]monata organo. Tio estas la minimuma forto-streĉo, kiun ĉiu devas fari, se ni volas esti tia Ligo, kia ni deziras aperi antaŭ la okuloj de niaj eklezioj, al kiuj ni direktas nian varbadon: Spirita komunumo transe de lingva disigiteco, kiu estas reala ne nur dum la kongresa periodo.

Kaj ne preterlasu komuniki al la redaktoro vian simpation aŭ malkonsenton, ĝojon aŭ bedaŭron pri iuj partoj de la enhavo – ne nur kiam vi deziras enpresigon de via opinio. La redaktoro bezonas ricevi multe pli da eĥo ol ĝi povas presigi. Certe, DR ne estas la sola revuo regule alvenanta kaj postulanta atenton. Sed per la rango, kiun vi donas al ĝi en la vico, esprimiĝu la graveco, kiun vi atribuas al ĝi. Ĉe mi, ĝi okupas unu el la plej altaj lokoj – ĉar mi kredas, ke nia laboro ne estas vana, sed tre necesa. Se temus pri nura ludilo, verŝajne mi domaĝus la tempon.

# Raporto pri la dankmeso intence al IKUE, KELI kaj precipe al pastro Bernhard Eichkorn

Raportas pastoro John Bright Lightson








Dimanĉon, la 8-an de februaro 2009 en la eklezio "PROMISE FAITH CENTER" de la 14-a horo kaj duono ĝis la 17-a horo okazis granda dankmeso intence al IKUE / KELI pro donaco de Biblioj kaj kantlibroj.

La pastoraro konsistanta el pastoroj AHALI Thomas, KAKANOU Norbert, N'TCHADE N. Basile, BENNY, AGBEY, Jérôme JOHNSON, Bishop ASSIAKO-LEY Attah Messah, Steven Sododi, Amavi Kouevi, Ametsi Defiaw, Abraham Agbog-baze, Emmanuel Sessou, James Adoukpo Mensanh Kossi, John Agbolo, Asinyo Yaovi, gvide de P-ro John Bright Ligthson, preĝadis kune kun la ĉeestantaro por la unuiĝo de eklezioj en la reaĉeto de animoj por Kristo. En sia mesaĝo al fideluloj, pastoro John forte substrekis tiun aspekton de la eukumenismo. Fine li kuraĝigis ilin lerni la neutrale internacian lingvon, kiu estas granda ilo por tiu unuiĝo interhoma.

Lomé, la 9-an de februaro 2009.
La prezidanto, pastoro John B. Lightson






# Ekumena Kongreso en Vroclavo 2009

Aktualan informon vi trovas sur la ttt-paĝo:
www.b-eichkorn.homepage.t-online.de/

## Novaj aliĝintoj

176 S-ino SZOSTAK Stanisława, Pollando
177 S-ino LIWIŃSKA Stanisława, Pollando
178 S-ino PROSTACKA Adela, Pollando
179 S-ino SACHA Alicja, Pollando
180 S-ino MATKOWSKA Romana, Pollando
181 S-ino PUILENBROCK Ruth von, Svislando
182 S-ro TORRES Juan Antonio, Hispanio
183 S-ro KAMINSKÝ Matej, Slovakio
184 S-ino WASILEWSKA Maria, Pollando

## Laŭlanda nombro

| | |
|---|---|
| Aŭstrio | 4 |
| Britio | 2 |
| Ĉeĥio | 10 |
| Danio | 1 |
| Francio | 5 |
| Germanio | 13 |
| Hispanio | 1 |
| Hungario | 16 |
| Italio | 9 |
| Kroatio | 1 |
| Litovio | 27 |
| Nederlando | 3 |
| Pollando | 70 |
| Rumanio | 11 |
| Slovakio | 5 |
| Svedio | 4 |
| Svislando | 2 |
| **Entute** | **184** |


Bildo de la urbo Vroclavo


Kongresejo - porpastra seminario

# La Sankta Lando

## Ĉerpo el la karesma FBCE[1]-letero 2009

David W. BISSET, UK

Ĉiu-dimanĉe ni aŭdas aludojn al la Sankta Lando: la rivero Jordano, Betleĥemo, Gazao (ja ĝi!), kaj multaj aliaj lokoj. La lago Galilea kreas bildojn pri la frua kariero de Jesuo. Nazareto memorigas nin pri lia knabeco. Samario (la Okcidenta Riverbordo) restarigas memorojn pri la sinteno de Jesuo al la samarianoj, kiuj estis abomenitaj de siaj samtempuloj. Multaj el tiuj lokoj estas sanktaj ankaŭ por Islamanoj kaj Judoj, precipe Jerusalemo, kie troviĝas la Templo, kaj la tria plej sankta loko en Islamo.

Oni supozus, ke la Sankta Lando estu haveno de paco, justeco kaj toleremo: celo de pilgrimado por la tri monoteismaj relegioj; tamen, la realaĵo malsimilas; kaj Britio multe kulpas! La Balfour-deklaro (1917) kuraĝigis la cionisman ekprenon de lando kie Kristanoj, Judoj kaj Islamanoj loĝis paceme dum jarcentoj. La Brita Mandato daŭrigis la subtenadon de la cionistoj.

Israelo stariĝis en 1948; la palestinanoj perdis sian landon, kaj centmiloj estis forpelitaj al fuĝejoj kie ili ankoraŭ troviĝas. La postaj jaroj markiĝas de perforto kaj premiteco. La restantaj partoj de Palestino (la Okcidenta Riverbordo kaj Gazao) estis akaparitaj de Israelo en 1967; kaj la okupado daŭras. En 1993 la konkordo de Oslo promesis palestinan ŝtaton en la Okupitaj Landoj post kvin jaroj. Tamen, Gazao nun estas prizono kaj la Okcidenta Riverbordo suferas pro infrastrukturo de terurigo, kaj almenaŭ 500 000 neleĝaj setlistoj. La palestina komunumo aŭ rezistas aŭ estas plena de malespero. La antaŭnelonga milito kontraŭ Gazao, kun la subteno de preskaŭ ĉiuj israelanoj, indikas la brutaliĝon de Israelo.

La starigo de unu lando por ĉiuj ŝajne estas malproksima; sed nur tia solvo venigos pacon, justecon kaj liberecon – al la Sankta Lando. ☙

1 – FBCE signifas *Fellowship of British Christian Esperantists* t.e la brita sekcio de KELI.



# Informatoj



## Arne Lundkvist,
### 90 jara la 14an de majo

Arne Lundkvist en Värnamo, Svedio, festos sian 90-jaran naskiĝtagon la 14an kaj la 16an de majo. Multaj gastoj estas jam anoncitaj sed certe restos ankoraŭ loko por pli da gratulantoj.

Arne Lundkvist en Pribylina 2008
Fotis: Václav POSPIŜIL

---

## Verŝajne Dio ne ekzistas
### laŭ artikolo en Finacial Post

Dumvintre en Britio 800 busoj portis la anoncon ke "Verŝajne Dio ne ekzistas, do ne plu zorgu kaj ekĝuu vian vivon" (libere tradukita). La kampanjon aranĝis la nove kreita Brita Humanisma Asocio laŭ modelo de simila kampanjo en Usono pasintan novembron. Tamen estis ateisma kampanjo, multaj inter la ateistoj ne samopiniis kun la kampanjo kaj tute ne kun la ideo fari asocion ĉar tio estas iom kontraŭa al ilia propra pensmaniero. /Redaktoro





## LA PLEJ BELAJ FLOROJ



En la aŭtuno mi kolektis
ĉiujn miajn zorgojn
kaj enterigis ilin
en mia ĝardeno.
Kaj kiam aprilo
revenis en la landon
kaj anoncis sin printempo
por edziĝi kun la tero,
ekkreskis en mia ĝardeno
la plej belaj floroj,
aliaj ol ĉiuj aliaj.
Kaj venis miaj najbaroj
por admiri ilin,
kaj ĉiuj diris al mi:
Kiam ree anoncos sin aŭtuno
kaj vi povos kolekti semon,
bonvolu donu iom al ni,
por ke ankaŭ ni havu
tiajn belajn florojn
en niaj ĝardenoj...

Kahlil Gibran

Tradukis: Jacques TUINDER

* Ĝibran Ĥalil ĜIBRAN (naskiĝis la 6-an de januaro 1883 – mortis la 10-an de aprilo 1931) estis libana poeto kaj artisto. Li naskiĝis en Libanio, sed pasigis la plimulton de sia vivo en Usono. Li famiĝis pro, inter alie, siaj verkoj *La Profeto* (1923) kaj *Jesuo, la Filo de la Homo* (1928). Li kombinis partojn de okcidenta kaj orienta mistiko.
[el Vikipedio]